

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Vi aŭdas la kvaran prelegon pri tiu temo.

En aŭgusto 1962 sinjoro Thant prezentis konstruigan Planon por nacia reamikiĝo al la prezidantoj Adula kaj Tshombe. Tiu plano ricevis la nomon de la ĝenerala sekretario de Unuiĝinta Naciaro. Prezente ĝin U Thant precizigis, ke tiu projekto ne plu povis fariĝi objekto de negocado. Ĝi nur povis estis akceptita aŭ malakceptita. Tamen ne estis trudita solvo, ĉar ĉiu partio rajtis ĝin rifuzi. Ambaŭ prezidantoj ĝin akceptis. Estis granda progreso. Resume la Plano rekomendis la sekvantajn rimedojn :

« Adopto de nova Konstitucio stariganta federalan registaran sistemon ;

« Kvotigo de la eleksterlandaj enspezoj kaj devizrevenoj, tio inter la Centra Registaro kaj la interesataj Provincaj Registaroj ;

« Unueco de la mono ;

« Integrado de ĉiuj militaj kaj paramilitaj fortoj en la kadron de nacia armeo ;

« Proklamo de ĝenerala amnestio ;

« Refondo de la Centra Registaro en la celo asekuri la reprezentadon de ĉiuj politikaj kaj provincaj grupoj ;

« Revoko de ĉiuj reprezentantoj troviĝantaj eksterlande, kiuj ne estas komisiitoj de la Centra Registaro ;

« Rekono de movo-libero al la UN-personaro en tuta Kongolando.

Kiam la 3-an de septembro 1962 s-ro Tshombe akceptis tiun programon, estis granda ĝojo ne nur en Kongolando, sed en multaj aliaj mondpartoj. Sed bedaŭrinde la katanga prezidanto anstataŭ plenumi siajn promesojn, instigis sian ĝendarmaron konstrui baraĵojn en Elisabethville por malebligi la movojn de la UN-trupoj. Mi jam rakontis, kiel UN reagis. Ĝi perforte forigis tiujn baraĵojn kaj la 14-an de januaro 1963 s-ro Tshombe plian fojon rezignis pri sia kontraŭstaro al la Centra Registaro. La UN-personaro eniris la urbojn Kipushi, Jadotville kaj Kaminaville kun la aprobo de la kantanga Registaro, kiu fine decidis konkretajn rimedojn por efektiviĝi la Planon : la eliminon de la dungsoldatoj. La superaj oficiroj de la katanga ĝendarmaro ĵuris fidelecon al s-ro Kasavubu, la prezidanto de la Kongolanda Respubliko ; la katangan monon anstataŭis nacia mono kaj la kvotigo de la enspezoj kaj deviz-envenoj, kiuj rezultas de la operacioj de la Mineja Unuiĝo, estas studata. La situacio do subite konsiderinde pliboniĝis.

Nun, kiam repaciĝo ŝajnas sur la bona vojo, oni povas sin demandi, kiom kostis al Unuiĝinta Naciaro tiu kongolanda Operacio, en homoj, mone kaj materie.

Ni ĉiuj memoras ankoraŭ la aviad-akcidenton, en kiu mortis la ĝenerala sekretario Dag Hammarskjöld kun sep UN-funkciuloj kaj UN-soldatoj. En la tuta mondo la homoj subite konsciiĝis pri la graveco de la monda krizo, kiu povus okazi, se la elekto de anstataŭanto al la bedaŭrata ĝenerala sekretario naskus disputojn internaciajn. Tio feliĉe ne okazis.

Cent dudek sep oficiroj kaj soldatoj de Unuiĝinta Naciara Forto en Kongolando mortis en operacio, kvindek aliaj mortis pro akcidentoj, kaj cent tridek tri vundiĝis. Dudek kvar mortis pro natura morto. Tiuj perdoj dispartiĝas inter 21 naciaj kontingentoj. Ni havu penson por tiuj soldatoj, kiuj ne mortis por la patria dio, sed por tutmonda kaŭzo. Tiuj UN-soldatoj pruvis belan grup-spiriton en kondiĉoj ofte penigaj : pensu al la malsaniga klimato, al la longaj lacigaj labortagoj, al la senĉesaj provokadoj al kiuj estis ordonite ne respondi. Verŝajne

neniam armeo grupigis tiom da divers-devenaj homoj kaj neniam konkero uzis tiel sisteme neperfortajn rimedojn.

La plimulto de la personaro de la Sekretariejo ĉe la sidejo de UN kaj multaj funkciuloj de la eksteraj oficejoj devis plenumi konsiderinde plian laboron por permesi rapidan disvolviĝon de la Operacio.

La bezonoj kreas la organizojn. La neceso malebligi armitan konflikton fine donis vivon al utopia revo : al tutmonda polico. Ni jam sentis tiun naskiĝon, kiam UN sendis siajn bluajn kaskulojn en milit-eksplozivegajn lokojn : Koreo, Izraelo... sed kritikemuloj tiam ankoraŭ rajtis dubi pri la neceso de konstanta tutmonda polico. Hodiaŭ tiu kritiko pruvas deziron malfortigi la pac-laboron de Unuiĝinta Naciaro.

Nova organizo, tio signifas novajn elspezojn. Vi scias, ke hodiaŭ UN troviĝas antaŭ malfacila financa situacio. Ĝi evitis al la mondo militon, kaj anstataŭ ĝin beni la registaroj lasas ĝin almozi. Kaj la popoloj ne reagis. Ili ne ankoraŭ komprenis, ke tiu UN-Forto estas unu el la kondiĉoj por internacia malarmado.

La Kongolanda Operacio kostis al UN proksimume po 10 milionojn da dolaroj monate. La totala kosto de julio 1960 ĝis la fino de 1962 altiĝas proksimume al 290 milionoj da dolaroj. En steloj tio faras 1 miliardo 857 milionoj da steloj. Sed ne estas tre multekoste, ĉar multaj registaroj rezignis peti repagon por siaj servoj. Se oni konsideras la soldat-nombron : proksimume 19'000 oficiroj, suboficiroj kaj trupanoj en februaro 1963, la kosto de tiu Operacio estas nepre malalta. La klarigo estas, ke ĝenerale la landoj, kiuj liveras trup-kontingentojn, ne petas al UN pagi iliajn ordinarajn soldojn.

Materie la ekipado kaj necesaj akcesoraĵoj trege varias. Ili iras de la ĉiutaga nutraĵo al la reaktor-aviadiloj.

Same kiel la solviĝo de la monda multlingveco troviĝas en la naskiĝo de monda lingvo, la solviĝo de la internacia konkurso al armado troviĝas en la naskiĝo de monda armita kontrolforto. Ni meditu tiun fakton en niaj lokaj grupoj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Se vi deziras aŭdi la sekvantajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-